

Heinrich Heine,
Kie, laca vagabon-
do

*tradukita de Kálmán Ka-
locsay*

Kie, laca vagabondo,
trafos mi al lasta hejm' ?
Ĉu sub suda palmofrondo?
Sub tilio apud Rejn' ?

Ĉu min en dezert' enfosos
haste ies fremda man',
aŭ en sablo mi ripozos
borde de la ocean' ?

Kie ajn! Min la ĉieloj
brakos, kiel tie ĉi,
kaj funebro-lampe steloj
ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Grabspruch" de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-13 -
†1856-02-17) en Esperanton de
KÁLMÁN KALOCSAY (Kalma-
no Kaloĉajo, *1911 - †1976).*

*Arg-63-1083 (2010-05-26
19:45:24)*

Heinrich Heine,
Grabspruch

Wo wird einst des Wandermüden
letzte Ruhestätte sein?
Unter Palmen in dem Süden?
Unter Linden an dem Rhein?

Werd' ich wo in einer Wüste
ingescharrt von fremder Hand?
Oder ruh' ich an der Küste
eines Meeres in dem Sand?

Immerhin! Mich wird umgeben
Gottes Himmel, dort wie hier,
Und als Totenlampe schweben
nachts die Sterne über mir.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 - †1856-02-17).*

*MR-261-1c / Arg-63-122 (2003-10-26
01:05:12)*

Heinrich Heine,
Tombosentenco

*tradukita de Manfredo Ratis-
lavo*

Kie estos ripozejo
lasta de migranto mi?
Ĉu sub palmoj en forejo?
Aŭ ĉe l' Rejno sub tili' ?

Ĉu enfosos min malpie
iu en dezerta land' ?
Aŭ ĉu mi ripozos ie
en la sablo de marstrand' ?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie
la ĉiel' de l' granda Di',
steloj tie ĉi kaj tie
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo
"Grabspruch" de HEINRICH
HEINE (*1797-12-13 - †1856-
02-17) en Esperanton de
MANFREDO RATISLAVO (Man-
fred Retzlaff, Stettiner Str. 16,
D-59302 Oelde, Germanio,
1938-11-04) en 1993.

*MR-261-1c / Arg-63-123
(2010-05-26 19:44:33)*